

Valentin Thilo,  
Pretigu serioze

*tradukita de Albrecht Kronenberger*

1. Pretigu serioze  
la korojn vi en vi.  
Aperos grandioze  
Jesu', la sav' de Di',  
hero' el Dia glor',  
de l' Patro promesita,  
por lum' kaj viv' donita  
el graco kaj favor'.

2. La korojn sen prokrasto  
preparu al Jesu',  
al via granda gasto.  
Ne restu ŝtonoj plu.  
Pretigu vin kun ĝoj'.  
La montojn malaltigu,  
la valojn ebenigu,  
ke glatu Lia voj'.

3. Humilo kaj modero  
valoras antaŭ Di'.  
Aplombo kaj fiero  
kondukas al neni'.  
Obea justa kor'  
orgojlon abomenos,  
kaj pretos, kiam venon  
Jesuo, la Sinjor'.

4. Jesuo, min pretigu  
Vi mem, per bon' kaj ben'.  
Advente apertigu  
Vi min por via ven'.  
Eniru do en min  
de l' stalo kaj de l' kripo,  
kaj koro, lango, lipo  
eterne dankos vin.

...

*Traduko de la Germana poemo "Mit Ernst, o Menschenkinder" de VALENTIN THILO (\*1607-04-19 – †1662-07-27) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (\*1940-01-21) en 2012-10-07.*

*Arg-724-1459 (2012-12-23 14:25:29)*

*Tiu ĉi Esperantigo de la eklezia kanto aperis en la jaro 2012 en la n-ro 6 (897) de la dumonata kristano revuo "Dia Regno". La kanto estas kantebla laŭ la eklezia kristana kanto "Von Gott will ich nicht lassen".*